Tampaknya kami berhasil menyebarkan informasi mengenai Esperanto pada kurang lebih seribu orang. Walaupun begitu, itu jumlah yang kecil bila dibandingkan dengan seluruh penduduk Jakarta. Kami akan terus berkampanye sampai bulan Juli 2013 dan sesudahnya, juga melalui cara-cara lain.

Ilia Sumilfia Dewi

Radio-intervjuo en Bandung

La 29an de Junio de la 6a ĝis la 7a horo posttagmeze estis intervjuita Syauqi Ahmad, Iyan Septiyana, kaj Silvi Fardila ĉe RRI Bandung Pro 2 dum la programo kun la nomo "Komunuma angulo de anglalingva servo". Ĉefe ni parolis pri la E-klubo en Bandung, sed ni ankaŭ parolis pri Esperanto mem. La intervjuistino ankaŭ diris, ke ŝi interesiĝas lerni Esperanton kaj ŝi espereble povos reinviti nin por intervjuo, kiam okazos la Esperanto-Tago.

Syauqi Ahmad Zulfauzi

Wawancara di Bandung

Pada tanggal 29 Juni 2013, Syauqi Ahmad, Iyan Septiyana, dan Silvi Fardila diwawancarai oleh RRI Bandung Pro 2 dalam program "Pojo Komunitas - siaran berbahasa Inggris" pada pukul 18.00-19.00. Kebanyakan kami membahas mengenai klub Esperanto Bandung, namun kami juga membahas mengenai Esperanto itu sendiri. Pewawancara juga mengatakan bahwa ia tertarik mempelajari bahasa Esperanto dan ia juga berharap bisa mengundang kembali kami pada Hari Esperanto nanti.

Syauqi Ahmad Zulfauzi

Esperanto ĉe radio

La Ĝakarta E-klubo ricevis inviton de s-ino Nina Tamam por havi intervjuon pri Esperanto ĉe la privata radio *I-radio* la 5an de junio. Nina scias iom pri Esperanto per la porvojaĝanta klubo Couchsurfing, kaj ŝi emas informi pri ĝi ĉe la radio dum la porkomunuma programo.

Tiutage kvar personoj de Ĝakarta E-Klubo (Sasri, Ratna, Liola kaj mi) renkontiĝis en restoracio *McDonalds* en la konstruaĵo Sarinah je la 6a horo

posttagmeze kaj ni iris kune al la radio en 8a etaĝo. Tie nin gastigis la estro de radiostacio kaj anoncistoj s-ino Kiki kaj s-ro Sandy. Ili diskutis kun ni iom pri Esperanto. Post interparolo kaj preĝo, komenciĝis la intervjuo.

Kiki kaj Sandy komencis la intervjuon per saluti la aŭskultantojn kaj ankaŭ nin, poste ili intervjuis nin pri tio, kio estas Esperanto, kio estas la E-movado en Indonezio ktp. Dum la intervjuo ni ankaŭ ŝercis kaj ridis, speciale kiam Kiki mokis Sandy per frazo 'Vi estas malbela' kaj diris, ke la signifo estas 'Kamu sangat keren' (vi estas tre bela).

La intervjuo estis dividita en kvar eroj, inter kiuj sonis kantoj kaj reklamoj. La aŭskultantoj, kiuj nomiĝis *i-listener*, ankaŭ povis demandi pli per la Twitter-konto <https://twitter.com/lradiojakarta>. Ni eĉ ricevis saluton de s-ro Eng el Malajzio, ĉar antaŭe mi jam sciigis en la Twitter-konto @BahasaEsperanto, ke la intervjuo aŭdeblos rete.

Finiĝis la intervjuo kaj poste ni fotiĝis kun la anoncistoj. Ni ankaŭ donis al ili memorajon. Ni tre ĝojas ĉar ni povis propagandi Esperanton per radio. Ni esperas, ke ni povas pli propagandi Esperanton en aliaj okazoj. Ni propagandu Esperanton!

Eko Nur Syah Hidayat

Esperanto di Radio

Klub Esperanto Jakarta mendapat undangan dari Sdr. Nina Tamam untuk mengadakan wawancara seputar Bahasa Esperanto di radio swasta *I-radio* pada tanggal 5 Juni 2013. Nina tahu sedikit tentang Esperanto dari Couchsurfing, salah satu klub pelancong, dan kemudian tertarik untuk menyiarkannya di radio dalam salah satu acara khusus komunitas.

Saat hari-H, 4 orang dari Klub Esperanto Jakarta, yaitu saya, Sasri, Ratna, dan Liola bersepakat untuk

berkumpul di depan gerai *McDonalds Sarinah* pukul 18.00 lalu bersama-sama menuju kantor radio tersebut. Di sana kami disambut oleh pengurus setempat dan juga Kak Kiki dan Kak Sandy sebagai penyiar. Mereka mengobrol bersama kami membicarakan sedikit hal mengenai Esperanto. Setelah sedikit berbincang dan melaksanakan salat, siaran baru dimulai.

Kak Kiki dan Kak Sandy memulai siaran dengan menyapa pendengar dan juga kami, setelah itu barulah kami membahas apa

itu Esperanto, bagaimana pergerakannya di Indonesia, dll. Wawancara diselingi dengan canda tawa, terutama saat Kak Kiki menggoda Kak Sandy dengan kalimat 'Vi estas malbela' dan berkata bahwa artinya adalah 'Kamu sangat keren'.

Siaran dibagi menjadi empat sesi, tiap sesi diselingi lagu-lagu dan iklan. Pendengar yang disebut *I-listener* juga bisa bertanya lewat akun Twitter <https://twitter.com/lradiojakarta>. Kami bahkan mendapat salam dari Tuan Eng di Malaysia, karena sebelumnya saya telah memberi tahu di akun Twitter @BahasaEsperanto bahwa siaran tersebut dapat didengarkan via internet.

Setelah wawancara selesai kami berfoto bersama para penyiar. Kami juga memberikan kenang-kenangan Esperanto kepada mereka. Kami sangat senang kami bisa menyebarkan Esperanto di radio. Kami berharap bisa menyebarkan Esperanto melalui acara-acara lain. Ayo kita sebarakan Esperanto!

Eko Nur Syah Hidayat



Kun anoncistoj (Sandy kaj Kiki)

En <https://www.sites.google.com/site/esperantoenindonezio/intervjuoj-en-radio-kaj-televido-troveblas-listo-de-intervjuoj-kiuj-aperis-en-esperantujo-kaj-en-indonezio-rilate-al-esperanto-en-indonezio-intervjuoj-por-e-radioj-ankoraŭ-aŭskulteblas-kaj-ĉelkaj-el-la-indoneziaj-intervjuoj-ankaŭ-haveblas-se-vi-petas-ĉe-heidi.goes@gmail.com>. Ilu tro pezas por meti en la retejo.



Denova rendezuo kun la lando de ĉiama somero

Post la reveno el Indonezio aŭguste 2011 mi ne forlasis la ideon iam denove reveni al la insularo pro ricevitaĵaj fortemociaj kaj agrablaj impresoj pri ĉio, kion mi spertis dum la unumonata restado en la lando de ĉiama somero. La okazo prezentiĝis januare 2013, kiam mi denove "invadis" al Indonezio efektiveginte la vican E-instruvojaĝon. Mi entreprenis ĝin pro insistaj petoj dum la UK-o (Hanojo,

"Per varmaj maroj ĉirkaŭfluita
Per praaj arbaroj kovrita
La naskiĝlando Indonezio
En niaj koroj ni gardas amon
al vi...
Plena de beleco
En la koro vi estas sola,
Indonezio – mia amo."



Eble, ankaŭ tiu-ĉi kanto enradikiĝinta en la memoro ekde infanaĝo influis mian decidon konatiĝi kun Indonezio?

Ĉiuj scias, ke pitoreska verdaĵo kaj varma klimato pozitive influas al iu ajn homo fizike kaj psike. Des pli nekontestebla estas la fakto, ke la verda koloro estas koloro de kampoj kaj arbaroj, de ekvilibro kaj harmonio, de trankvilo kaj espero.

La verda koloro unuigas nin kun la naturo, helpas al ni, ho-

moj, esti pli proksime unu al alia kaj forigi negativajn emociojn. Pluse (kaj tio estas alia kialo por veni al ĉeekvatora lando), se konsideri mian esperantistiĝon ekde adoleska aĝo, la vortoj **verda**, **espero**, **harmonio** elvokis ĉe mi ankaŭ nepran bezonon apliki miajn E-sciojn: mia esperantista animo impetis viziti Indonezion por renkontiĝi kun lokaj geesperantsitoj kaj transdoni miajn E-sciojn al ĉiuj E-entuziasmoj.

Jam aŭtune 2012 mi komencis kompili planon de la ĉi-januaraj vojaĝoj. Geesperantistoj el Bandung kaj Batam daŭre esprimis deziron organizi E-kursojn. En Ĝakarto reeĥis reprezentantoj de Gunadarma-Universitato (Ĝakarto/Depok). La plano de la vojaĝo estis afiŝita en la Facebook-retpaĝo de la indoneziaj esperantistoj. Ĉi-artikole ĝi estas iom mallongigita.

« La plano de mia Esperanto-instruvojaĝo en Indonezio (2013) jenas:

- la 4an – la 8an de januaro - E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Gunadarma-universitato (Ĝakarto/Depok) ;
- la 9an – la 13an de januaro – E-kursoj por komencantoj, progresantoj kaj instruantoj en Bandung;
- la 14/15an – la 19an de januaro – E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Batam.

Certe, por lokanoj ĉiam estas interese scii kialojn, pro kiuj tiu aŭ alia eksterlandano venas al ilia lando, kion novan kaj interesan ŝi aŭ li ekvidas aŭ ekscias, kio plaĉas en ilia lando aŭ kio ne estas akceptebla. Ankaŭ mi havis miajn kialojn por viziti Indonezion. Unu el ili estis la jena. Mi loĝas en la klimata zono, en kiu tre klare diferencigas kvar jaraj sezonoj: vintro, printempo, aŭtuno kaj somero. Same kiel aliaj loĝantoj de nia regiono en vasta Rusio, vintre mi ne povas eviti malaltajn temperaturojn (iam ĝis -30°-40°). Tial ekkoni la landon, en kiu la somero ĉiamas, estis mia delonga revo. Pri la samo revis/as aliaj miaj samlandanoj: tutjara varmo, verdaĵoj, fruktoj kaj... nebezono surmeti peltpaltojn kaj -ĉapojn, botojn, gantojn! Same ĝis nun konserviĝis en la memoro de multaj sovetianoj (Rusio estis parto de Soveta Unio, kiu ekzistis ĝis la jaro 1991) la vortoj de la kanto pri Indonezio, verkita en la jaro 1955 (bv. aŭskulti en la rusa lingvo en <http://www.youtube.com/watch?v=Y--UxSVirAc&>). Ĝiaj kelkaj linioj en mia laŭvorta traduko jenas:

Mi invitas ĉiujn dezirantojn konatiĝi kun la Internacia lingvo aŭ perfektigi ĝian konon. Bv. kontakti la lokajn organizantojn. »

Mi instruis en ĉiuj menciitaj lokoj ĉiutage krom dimanĉoj kaj la lasta vendredo.

En la Gunadarma-Universitato (Ĝakarta/Depok) la E-kurson partoprenis gestudentoj kaj geinstruistoj. Organizantoj: vicrektoro Ravi Ahmad Salim kaj instruistino Heri Agustina.



En la urbo Bandung mi instruis en du lokoj: en Pasundan-universitato kaj en la Muzeo pri la Afrika-Azia Konferenco. Notindas, ke la Muzeo funkcias sub aŭspicio de la Ministerio pri eksterlandaj aferoj kaj ĝiaj funkciuloj s-ro Desmond S. Andrian (respondeculo pri E-aktivado) kaj la novpostenita estro de la Muzeo s-ro Tomas Siregar forte subtenas E-instruadon kaj E-lernadon. Krom ili, en organizado de E-kursoj aktive kunhelpis la administracio de la politika fakultato de Pasundan-Universitato kun senduba partopreno de Fadil Poeta, Iyan Septiyna k.a.

En la insulo Batam E-kursoj okazis por gejunuloj en la protestanta preĝejo kaj en la Riau Kepulauan-universitato por ĝiaj oficistoj kaj instruistoj. Organizanto: Endang Sabrina.

Por efika E-instruado mi pretigis E-materialon en formo de PowerPoint-prezentadoj kaj venigis iom da rusiaj E-legolibroj por komencantoj kaj progresantoj, kiujn mi donacis al la organizantoj de E-kursoj por iliaj grupoj. Mi disponigis al ili ankaŭ kopiojn de ĉiuj komputilaj prezentadoj, same kelkajn E-videojn. Al la organizantoj de E-kursoj en Batam kaj en la Muzeo (Bandung) mi donacis "La Universala Lingvo", novan dokumentan filmon (DVD) de Oskar-premia nomumito Sam Green.

Konklude mi povas diri, ke entute la vojaĝo al Indonezio estis sukcesa: la organizantoj de E-kursoj serioze kaj respondece prepariĝis: en ĉiuj lokoj eblis uzi komputilojn, projektilojn, ekranojn dum instruhoroj, estis organizitaj renkontiĝoj kun oficialaj reprezentantoj de universitatoj kaj estis kunvenigita

sufiĉa kvanto da gejunuloj, kiuj partoprenis la E-kursojn. Tamen, lokaj geesperantistoj daŭre lingvan spertiĝon kaj diversflankan subtenon. En Ĝakarta januare oni ne havis

propran lokon por E-renkontiĝoj, tial la donacitaj libroj kaj E-material restas en hejmoj de geesperantistoj (ofta realo en nia E-mondo, bedaŭrinde!). Pli konvena por ili estus aŭditorioj de Gunadarma-universitato je serioza traktado de sia E-aktivado kun universitata administracio. Plej verŝajne, en Batam la loka protestanta preĝejo aŭ la universitato disponigis lokojn por E-kursoj. Mi ŝatus esperi, ke loka esperantistino Endang Sabrina ne preterlasis la aperintan eblecon kaj daŭre okazigas tie E-kursojn.

La plej esperiga kaj vere konvena loko de ĉiuj vidpunktoj por E-aktivado troviĝas en Bandung. La teritorio de la Muzeo (en la centro de la urbo) estas tre vasta kaj enhavas ĉion bezonatan por organizi landajn E-renkontiĝojn kaj eĉ Aziajn E-kongresojn. Interalie, la vica 8a Azia E-Kongreso okazos en Ĉinio en 2016. Ĉu la 9a AK okazos en Bandung? Tamen, antaŭ ol organizi ion similan, estraranoj kaj E-aktivuloj de la Muzeo je kunlaboro de la ĵus fondinta E-asocio sub gvido de Ilia Dewi (gratulojn kaj sukcesojn al ŝi pro la prezidanta posteno!) certe plispartiĝos ne nur lingve, sed ankaŭ je organizo de diversaj enlandaj E-aranĝoj. Fruktedonon E-aktivadon al ĉiuj geindonezianoj!

**Tatjana Loskutova
Ivanovo, Rusio**

*Pli ampleksan artikolon ĉi-teme, bv. vidi:
<https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/instruado/tatjana-2013>
(sube de la paĝo estas la pdf de tiu artikolo)*

Justa Komunikado: E - temo dum 2013

Justa komunikado estas situacio de komunikado inter homoj, en kiu ĉiuj havas la samajn eblecojn. Estas klare, ke, se kelkaj homoj rajtas paroli en sia denaska lingvo dum aliaj devas paroli en fremda lingvo, ne ekzistas tiu situacio de egaleco.

Per la elekto de unu aŭ kelkaj lingvoj super aliaj oni signalas la pli grandan gravecon aŭ la regadon de tiuj, por kiuj la uzataj lingvoj estas iliaj gepatraj lingvoj. Tiu elekto fariĝas rimedo por ekskludigi homojn de politiko, edukado, aliro al komercado kaj multaj aliaj aspektoj de la vivo. Ĝi fortigas sociajn-ekonomiajn malegalecojn inter grupojn.

Ekzistas lingvaj rajtoj de la homoj kaj ekzistas homaj rajtoj kun lingva enhavo. Libereco de sin esprimado kaj la uzado de iu lingvo estas nedisigeblaj.

Spertoj ĉirkaŭ la mondo montras, ke plurlingvaj politikoj povas pliampleksigi ŝancojn por homoj en multaj manieroj. Tio, kion egaleca mondo bezonas, estas trilingva formulo, cetere rekomendita de Unesko, kiu donas publikan rekonon al la uzado de tri lingvoj: gepatra, landa/regiona, internacia.

- Gepatra lingvo. Homoj deziras kaj bezonas povi uzi sian gepatran lingvon kiam tiu ĉi estas nek la regiona nek la internacia lingvo.
- Unu landa/regiona lingvo. Lingvo de loka ligado faciligas komunikadon inter malsamaj lingvogrupoj - kiel ekzemple la svahila en orientafrakaj landoj, kie ankaŭ multaj aliaj lingvoj estas parolataj.
- Unu internacia lingvo. En tiu ĉi epoko de tutmondiĝo, ĉiuj homoj devas esti kompetentaj en neŭtrala internacia lingvo, kiu metas ĉiujn popolojn je la sama nivelo, kiam temas pri internacia komunikado.

Landoj bezonas rekonon ĉiujn tri kiel oficialajn lingvojn aŭ almenaŭ rekonon iliajn uzadon kaj

Komunikasi yang setara adalah keadaan komunikasi di mana semua orang memiliki kesempatan yang sama. Sudah jelas bahwa jika ada yang bisa berbicara dalam bahasa ibu mereka sementara yang lain harus berbicara dalam bahasa asing, tidak terjadi kesetaraan di situ.

Pemilihan satu atau beberapa bahasa di atas yang lain menunjukkan keutamaan atau kekuasaan mereka yang menggunakan bahasa tersebut sebagai bahasa ibu. Pemilihan ini menjadi wahana untuk mengucilkan orang dari politik, pendidikan, akses pada barang-barang dan banyak bidang kehidupan yang lain. Hal ini mempertajam perbedaan sosial dan ekonomi antara golongan.

Terdapat hak-hak bahasa dan hak-hak asasi yang berkaitan dengan bahasa bagi manusia. Kebebasan berekspresi tak terpisahkan dari penggunaan bahasa manapun.

Pengalaman di seluruh dunia menunjukkan bahwa kebijakan-kebijakan multi bahasa dapat memperbanyak kesempatan bagi orang melalui banyak cara. Yang dibutuhkan oleh dunia yang setara adalah rumus tri-bahasa, sesuai rekomendasi UNESCO, yang memberikan pengakuan publik atas penggunaan tiga bahasa: bahasa ibu, bahasa daerah/negara, dan bahasa antarnegara.

- *Bahasa ibu: orang ingin dan butuh menggunakan bahasa ibu mereka ketika ini bukan bahasa setempat atau antarnegara.*
- *Satu bahasa daerah atau negara: bahasa yang mempersatukan secara lokal menjadi wahana komunikasi antara kelompok-kelompok yang berbeda bahasa - mis. Swahili di negara-negara Afrika sebelah timur, di mana banyak bahasa lain digunakan.*
- *Satu bahasa antarnegara: dalam masa globalisasi ini, semua orang harus fasih dalam satu bahasa antarnegara yang tak memihak, yang menempatkan seluruh bangsa dalam tingkat yang sama dalam hal komunikasi.*

Negara-negara perlu mengakui ketiganya sebagai bahasa resmi atau setidaknya mengakui pengajaran dan penggunaannya. Walaupun mungkin



instruadon. Ekzistas multaj versioj de tiaj trilingvaj formuloj, depende de la lando. Dum estas eble kaj eĉ dezirinde ke ŝtato resto "neŭtrala" pri etneco kaj religio, tio ĉi estas neebla por lingvo. La homoj en la mondo kaj la civitanaro en la unuopaj landoj bezonas komunan lingvon por antaŭenigi reciprokan interkomprenon kaj efikan komunikadon, sed samtempe rajtas utiligi sian gepatran lingvon.

La internacia lingvo Esperanto ofertas ilon neŭtralan por certigi la lingvajn homajn rajtojn je la internacia nivelo. "El ĉiuj planlingvoj de la mondo Esperanto estas hodiaŭ la plej konata kaj la plej uzata. Laŭ mi, ĝi alportos multajn avantaĝojn, se la homoj konsideros ĝin serioze... Esperanto bezonas malpli da lernotempo ol iu ajn 'natura' lingvo, ĉar ĝi estas regula kaj logika – ne havas esceptojn. Tamen, oni povas en Esperanto diri ĉion, kion oni volas, ĉar ĉiu povas facile krei novajn vortojn." laŭ la mondo konata lingvistino Dr. Tove Skutnabb-Kangas. Ĝi, krome, malhelpas la hegemoniismon de la momentaj grandaj potencoj. Tiu potencoj nuntempe estas la anglalingvaj landoj, kaj tial la angla iĝis tiel potenca tra la mondo. Sed, kia estos la estonteco post 50 jaroj? "Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiuj lingvoj estas, afero al kiu Esperanto signife kontribuas" laŭ alia konata lingvisto, Robert Phillipson.

Estas tempo ĉesi pensi sekvi la momentajn fortulojn, ni devas komenci starigi situacion de egaleco inter ĉiuj popoloj de la mondo. Esperanto estas ilo por atingi justan komunikadon.

http://uea.org/vikio/Justa_komunikado:_kio_ghi_estas

dan bahkan dikehendaki untuk mengatakan bahwa suatu negara tak memihak dalam hal suku dan agama, ini tak mungkin dalam hal bahasa. Bangsa-bangsa di dunia serta warga di masing-masing negara membutuhkan bahasa bersama untuk memajukan saling pengertian dan komunikasi yang efektif, dan pada saat yang sama, juga berhak menggunakan bahasa ibu mereka.

Bahasa internasional Esperanto menawarkan sarana yang tak memihak untuk memastikan hak asasi terkait bahasa dalam ranah antarnegara. "Dari semua bahasa buatan di dunia, sekarang Esperanto adalah yang paling dikenal dan digunakan. Menurut saya, keuntungannya akan sangat besar jika orang-orang mempertimbangkannya secara serius... Esperanto membutuhkan waktu lebih sedikit untuk dipelajari daripada bahasa alami manapun, karena ia sangat teratur dan logis - tanpa kecuali - dan seseorang dapat mengatakan apapun yang dia inginkan, karena ia dapat menciptakan kata-kata baru dengan mudah dalam Esperanto," menurut ahli bahasa yang diakui di seluruh dunia, Dr. Tove Skutnabb-Kangas. Esperanto juga mencegah hegemoni kekuatan besar kontemporer. Saat ini kekuatan-kekuatan tersebut adalah negara-negara berbahasa Inggris. Tapi apa yang akan terjadi 50 tahun lagi? "Esperanto memperkuat hak-hak pengguna berbagai bahasa berbeda secara bermakna," demikian menurut ahli bahasa terkenal lain, Robert Phillipson.

Sekaranglah waktunya berhenti hanya memikirkan untuk mengikuti kekuasaan sementara. Kita harus mulai menegakkan kesetaraan antara semua bangsa di dunia. Esperanto adalah alat untuk mencapai komunikasi setara.



Nun haveblas en indonezia lingvo!

*La libro de Stano Marček "Esperanto laŭ Reĝta Metodo" ĵus eldoniĝis en la indonezia lingvo. Ĝia titolo estas "Esperanto dengan Metode Langsung". Tradukita de 4 indoneziaj esperantistoj, tiu ĉi libro helpos vin pli rapide kaj pli facile lerni la internacian lingvon, Esperanto. Vi povas aĉeti ĝin kontraŭ Rp. 45.000,00/libro. Kontaktu **Ilia Dewi** ĉe 08111773387 aŭ estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.*



Presiĝis la 2a eldono!



*La ŝlosilo (Kunci) vi povas aĉeti kontraŭ Rp. 10.000,00/libro. La libro enhavas gravajn vortojn, por ke vi povu ricigi vian vortprovizion. Ĝi enhavas ankaŭ koncizan gramatikon por pli grandigi vian Esperanto-kapablon. Kontaktu **Ilia Dewi** ĉe 08111773387 aŭ estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.*

Komunike pertama < Bahasa Indonesia >



Para penutur bahasa Esperanto akan berkampanye selama tahun 2013 untuk kesetaraan berbahasa dengan slogan "Justa Komunikado" (Kesetaraan dalam berkomunikasi) berkaitan dengan Kongres Esperanto Dunia ke-98, yang akan diadakan di tempat bergensi, Pusat Harpa, Rejkjavik, Islandia, dengan sekitar 1.000 peserta lebih dari 50 negara. Kongres ini akan mengusung tema yang sama.

Dari periode yang singkat setelah 125 tahun, saat ini Esperanto termasuk diantara 100 bahasa yang sering digunakan dari 6.800 bahasa didunia. Bahasa ini menduduki urutan ke-29 dari bahasa yang paling sering digunakan di Wikipe-

dia, mengungguli bahasa Swedia, Jepang dan Latin. Esperanto digunakan diantara bahasa yang dipilih oleh Google, Skype, Firefox, Ubuntu dan Facebook. Google Translate, program penerjemahan di Google, akhir-akhir ini menambahkan Esperanto pada daftar 64 bahasa bergensinya. Layar sentuh pada telepon seluler pun saat ini dapat menggunakan bahasa Esperanto.

Saat ini semakin banyak orang yang berbicara dalam bahasa Esperanto, lebih dari bahasa Islandia, ini sesuai dengan buku tentang fakta dunia yang diterbitkan oleh CIA, Amerika Serikat.

Esperanto secara resmi diajarkan pada 150 universitas dan institusi pendidikan tinggi lainnya, serta pada 600 sekolah menengah dan tingkat dasar di 28 negara. Bahasa ini memiliki literatur yang kaya, terdapat lebih dari 50.000 judul, dengan terbitan baru muncul setiap minggunya. Disamping program penyiaran di radio dari berbagai negara, terdapat pula stasiun radio yang mengudara selama 24 jam bernama "Muzaiko" dan televisi internet di Cina.

Perkembangan Esperanto sempat dihentikan karena prasangka dan kurangnya pengetahuan, pengabaian fakta serta tujuannya. Adolf Hitler dan Joseph Stalin memburu para penutur Esperanto. Keduanya telah tiada, namun Esperanto tetap bertahan, tumbuh, berkembang dan kini secara aktif digunakan sebagai alat komunikasi antar manusia, diantara ribuan dan ribuan orang, lebih dari 100 negara di dunia.

UEA adalah mitra penasihat pada Unesco, serta berhubungan dengan resmi dan serasi dengan PBB dan Uni Eropa. Esperanto memungkinkan komunikasi antar bangsa yang netral dan tataran diskusi yang adil, saling pengertian, melindungi hak-hak minoritas dan bahasa tradisional/nasional, memperlakukan semua bahasa pada tingkat yang setara, menghargai budaya dan perbedaan bahasa bagi para penggunanya.

http://uea.org/vikio/Unua_komuniko_en_la_indonezia



ESPERANTO EN INDONEZIO estas neregula buleteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraĵ subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompenco pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui ĉiu ajn, se la kontribuajo konformas kun la celoj de la buleteno.

Por havi ĉiel eble plej kvalitan buletenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas niajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj, laŭeble, sekvi ilin. Dankon!

- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la indonezia lingvo.
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume centvortan, en la alia lingvo.
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu ĉiel eble plej seneraraj kaj en bona stilo.
- Bonvolu sendi la tekstojn en unu el la jenaj formatoj: **.txt**, **.rtf**, **.odt**, **.doc**. Nur se vi ne povas sendi en unu el la ĉi-supraj formatoj, sendu en **.wpd** aŭ **docx**. Ne sendu **.pdf**-dokumentojn!
- Se vi uzas surogaton por la Esperantaj literoj, uzu la saman por ĉiuj literoj de la dokumento.
- Uzu nur unu litertipon por unu dokumento.
- Se eblas, sendu ankaŭ bildojn, laŭeble altkvalitajn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni aparte, kun la jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo – iuj povus malaperi survoje.
- Sendu vian kontribuon per Facebook nur kaze, ke vi tute ne povas sendi retmesaĝojn, kaj resendu ĝin se vi ne ricevas konfirmon pri la ricevo.
- Bonvolu sendi la kontribuajojn ĉiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento.
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn.
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: **redakcio-ideo@googlegroups.com**.

Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La buleteno **ESPERANTO EN INDONEZIO** ricevas la membrojn de IEA. Por ne-membroj ĝi aĉeteblas ĉe la redakcio de IEA (redakcio-ideo@googlegroups.com) kontraŭ 1€/ekz. aŭ Rp 12.000,00 + efektivaj sendokostoj. Donacantoj al la indonezia Esperanto-movado ricevas ĝin elektronike kaj laŭpete ankaŭ papere.

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah sebuah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan kawan-kawan. Tim sukarelawan mengerjakannya dan buletin ini dapat terbit berkat para kontributor dalam dan luar negeri serta para donatur yang dermawan. Baik tim redaksi maupun kontributor tidak menerima kompensasi apapun atas kerja mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini.

Agar buletin tercipta sebaik-baiknya dan untuk mempermudah pekerjaan redaksi, kami meminta seluruh kontributor membaca dengan teliti saran dan petunjuk berikut, dan sebisa mungkin mematuinya. Terima kasih.

- Redaksi hanya menerima tulisan dalam bahasa Esperanto dan Indonesia.
- Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu dari dua bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasan (maksimum 100 kata) dalam bahasa satunya lagi.
- Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksalah tulisan tersebut lebih dahulu bersama orang lain yang lebih berpengalaman. Hal itu dapat dilakukan di pertemuan Esperanto, sebagai bagian dari pembelajaran, atau secara online. Kesalahan dalam tulisan sebisa mungkin diminimalisasi dan tulisan dibuat dalam gaya bahasa yang baik.
- Mohon kirimkan tulisan dalam salah satu format berikut: **.txt**, **.rtf**, **.odt**, **.doc**. Hanya jika Anda tidak bisa mengirimnya dalam salah satu format yang telah disebutkan, gunakan format **.wpd** atau **docx**. Jangan kirimkan tulisan dalam format **.pdf**!
- Jika Anda menggunakan 'pengganti' huruf Esperanto, gunakan format yang sama untuk seluruh dokumen.
- Gunakan hanya satu jenis huruf untuk satu dokumen.
- Jika mungkin, kirimkan juga gambar (sebisa mungkin yang berkualitas tinggi), yang sebaiknya tidak disertakan dalam dokumen teks. Gambar dikirim terpisah dari tulisan, dengan informasi untuk masing-masing gambar berupa penjelasan/judul gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat foto, jangan kirimkan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim terlalu banyak gambar dalam sekali pengiriman. Beberapa foto bisa saja hilang dalam proses pengiriman.
- Silahkan kirim kontribusi artikel Anda melalui Facebook hanya ketika Anda sama sekali tak bisa mengirimnya lewat surel (e-mail), dan kirimlah pesan itu sekali lagi jika Anda tak menerima konfirmasi bahwa artikel Anda telah diterima.
- Silahkan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu.
- Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat merespon permintaan redaksi dan mematuhi batas waktu.
- Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: **redakcio-ideo@googlegroups.com**.

Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.

Ĉu vi volas igi reprezentanto de la Indonezia Esperanto-Asocio en Japanio kaj Aŭstralio?

La Japana Esperanto-Instituto invitas unu junan indonezianon (malpli ol 40-jara) al sia centa nacia Esperanto-Kongreso en Tokjo (12-15a de oktobro 2013). JEI pagos la flugon, la kongresaliĝon, tranoktadon, parton de la manĝoj kaj bankedon dum la kongreso. La Aŭstralia Esperanto-Asocio invitas du indonezianojn al sia Somerkursaro kaj nacia kongreso en Kanbero/Canberra (4-12a de januaro 2014). Ili pagas la flugbileton, aliĝojn, loĝadon kaj manĝadon dum la kongreso. La Indonezia Esperanto-Asocio kompreneble tre ĝojas pri tiuj invitoj kaj dankas pro ili. Se vi volas iri al unu el tiuj kongresoj, bv. sendi vian kandidatiĝon en Esperanto al la estraro de Indonezia Esperanto-Asocio, kiu elektos inter la kandidatoj. En tiu kandidatiĝo vi skribas kiel vi volas partopreni unu el la kongresoj kaj kiel tiu partopreno helpas al vi kontribui poste al la indonezia Esperanto-movado. Antaŭ ol kandidatiĝi, bv. legi la subajn kondiĉojn kaj estu certa ke vi povu plenumi ilin. Pli specifajn kondiĉojn ricevos la elektitaj kandidatoj persone.

1. Vi bone regas Esperanton, parole kaj skribe.
2. Vi estas membro de IEA kaj pagis vian kotizon antaŭ via kandidatiĝo.
3. Vi partoprenos la tutan kongreson (antaŭ ol verki vian kandidatiĝo, certigu pri tio ĉe via lernejo/universitato/laborejo!).
4. Vi kapablas prezenti la indonezian Esperanto-movadon dum la kongreso (kompreneble en Esperanto!).
5. Vi kapablas kaj pretas kontribui al la kongreso per kultura prezento kaj/aŭ prelego kaj ankaŭ aktive partoprenas la kursojn kaj aliajn programerojn.
6. Post la kongreso vi verkos raporton pri ĝi por la estraro de IEA kaj JEI/AEA kaj artikolon por la bulteno Esperanto en Indonezio. Vi ankaŭ provizas la estraron/redakcion per fotoj (kaj se eble filmoj).
7. Vi kapablas mem pagi personajn dumvojaĵajn elspezojn, vian pasporton kaj vizon, manĝojn antaŭ kaj post la kongreso, ev. tranokton antaŭ kaj postkongrese (eblas aranĝi kun lokaj esperantistoj kaze ke (prefere!) vi volas resti pli longe en la lando).
8. Se vi elektigas kaj tamen fine ne povas iri, vi repagos la kostojn kiuj jam estas faritaj (kiel la flugbileto). Tio ne validas se la vizo estas rifuzita al vi.

Sendu vian kandidatiĝon por Japanio plej laste la 20an de julio 2013 (necesas tempo por la vizo ktp.!) kaj por Aŭstralio plej laste la 20an de aŭgusto 2013. La estraro faros la elekton kaj sciigos al la kandidatoj la rezulton ene de dek tagoj post tiuj datoj. Se vi havas iujn demandojn, ne hezitu demandi al la estraro (estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com).

Invito al Esperanto-Sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Okaze de tiuj konkursoj mi proponas al vi partoprenon en Esperanto-Sumoo. Ĝis nun neniam partoprenis indonezianoj. Sed post la landa kongreso haveblas en diversaj urboj Esperanto-libroj diversnivelaĵoj. Do ek al la legado!

I. Celoj

1. Altigi legkapablon de esperantistoj.
2. Kutimigi esperantistojn legi libron kun ĝojo.

II. Luktmannerio

1. Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso.
2. Decidu kiom da paĝoj vi legos por unu tago laŭ via kapablo.
3. Se vi legas pli ol promesitaj paĝoj ĝis la noktomezo de tiu tago, vi akiras unu venkon, se ne, unu malvenkon. Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi ne luktas kontraŭ aliaj luktestoj, sed kontraŭ vi mem.

III. Aliĝo

1. Sendu jenajn informojn al HORJ Jasuo: hori-zonto@water.sannet.ne.jp
Via nomo, sekso, lando, urbo, retadreso
2. Via luktesta nomo
3. Titolo de la libro, kiun vi legos, kaj kiom da paĝoj vi legos

IV. Septembra sumoo

La septembra sumoo okazos ekde la 15a ĝis la 29a de Septembro.

Vizitu nian TTT-ejon por pli detale scii pri Esperanto-sumoo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Iniciatinto de Esperanto-sumoo

HORJ Jasuo

<hori-zonto@water.sannet.ne.jp>

Membruĝu!

Aliĝu!

Kontribuu!

Keanggotaan IEA terbuka bagi semua rakyat Indonesia (lihat hal. 5). Yang penting Anda yakin akan pentingnya sebuah bahasa internasional yang mudah dipakai dan mendukung penyebarannya. IEA juga mengundang klub-klub Esperanto yang hendak bekerja sama atau mengikuti kegiatan yang ada. Hubungi pengurus IEA melalui estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.

Membreco en IEA estas malferma al ĉiu indoneziano (vidu p. 5). Sufiĉas, ke vi kredu je la graveco de utila internacia lingvo, Esperanto kaj ĝia disvastigo tra la lando. IEA ankaŭ bonvenigas klubojn kiuj volas igi sekcio de IEA. Se tio interesigas vin, kontaktu la estraron ĉe estraro-indonezia-esperanto-asocio@googlegroups.com.

